Raymond Schwartz,

# Venu ĉiuj al Parizo!

Kun ĝojplena la valizo
Venu ĉiuj al Parizo!
Kun batanta, febra koro
Plenplenega je fervoro!
Verda estu la ĉapelo,
Verda estu la mantelo,
Verdaj estu viaj ŝuoj
Kaj la pantalonaj truoj!
Kun brodita verdĉemizo
Venu ĉiuj al Parizo!
Venu kun edzin' kaj ido
Al la festo de l' revido!

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Raymond Schwartz *(∗1894-04-08 – †1973-05-13).*

*Arg-1072-2162 (2014-06-30 17:51:01)*

*La poemo troviĝas en* https://eo.wikisource.org/wiki/Schwrtz_Parizo_1914_GE#Venu_.C4.89iuj_al_Parizo.21 .